# SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio «Languedoc - Roussilon»

72, Avenue Général de Gaulle - **66000 PERPIGNAN** (Pyrénées-Orientales)

JARA ABONO : **5** F. C. C. P. 956-28 Montpellier

3-a Kvaronjaro 1976 N° 60

*AUTUNA KUNVENO*

*DE LA FEDERACIA KOMITATO*

<u>TEMO</u> : Aùtuna laborkunsido.

Karaj geamikoj,

Estis decidite ke nia aùtuna laborkunsido okazos en Sète la 17-an de oktobro sed pro renkontita malhelpo, ĝi okazos la <u>24-an de OKTOBRO</u>.Bone notu la ĝustan daton kaj la eventon diskonigu.

Kiel antaùvidite ĝi okazos en Sète, ĉe "Centre Familial du Lazaret", strato Bretagne? Urbaj aùtobusoj, haltantaj ĉe la stacidomo, iras ĝis la placo E. HERRIOT kie komenciĝas la strato Bretagne.

La komuna tagmanĝo kostos 25,00 frs. po persono, ĉio enkalkulita. Estas necese ke la monon kaj la liston de la manĝontoj oni sendu, plej baldaù kiel eble al D-ino VIERNE 5, rue Dr Roux - 34000 - Montpellier.

La kunveno povos komenciĝi je la 9,30 h. sed ne pli malfrue por ke ni povu utile labori.

Pri sugestoj kaj demandoj vi skribu al mi por envicigo en la tagordon.

Do ĝis revido en Sète la 24-an de oktobro.

Dume mi plej amike salutas vin.

Jean AMOUROUX.
1, rue de Sorède,
66000 - Perpignan.

# L I T E R A T U R A   P A Ĉ O

Doktoro SALAN entreprenis tre gravan taskon. Li ja komencis traduki esperantlingven franclingvan romanon de Robert MERLE "La Morto estas mia Metio".

Tiu verko (325 p.), unuafoje eldonita dum la jaro 1953, ĝuis de tiam plurajn dekojn da reeldonoj.

Ĝi laŭetape priskriba, kvazaŭ aŭtobiografie, la irvojan de homo, - kies infanaĝo estis terurigita de fanatika, kvazaŭ freneza patro, - al superega estreco de naziaj koncentrejoj.

Tiun estrecon, kiu fakte estas nenio alia ol amasmortigo de milionoj da senkulpuloj, nia "heroo" plenumas kiel funkciulo fervora kaj skrupulema, dum li, en sia familio kun edzino kaj infanoj, tre digne vivas.

Tiu verko celas esti nek pledo nek kulpigo, sed psikologia studo pri la destino de homo kies patro "lavis la cerbon", kaj kiu dum sia tuta vivo nur kredis al patrio, ordonoj, disciplino, obeemo kaj devo.

Fakte li estis purega tipo de aŭtomato.

Mi konsideras, kvankam Robert MERLE ĝin ni eksplicitas, ke sumo da tiaj virtoj, altigitaj ĝis nekonsciebla supro, povas estiĝi - laŭ mia opinio - nur en denaska bruto.

## Resumo del' ĉapitroj

La ĉapitroj de tiu verko ne estas titolitaj sed jardatumitaj de 1913 ĝis 1945.

1913 - Ĝi povus esti titolita: kiel patro lavas la cerbon de sia filo.
1916 - Kvankam nur deksesjara nia "heroo" partoprenas en Turkio la unuan mondmiliton.
1918 - Post malvenko de Germanio, li baraktas en tre malfacilaj vivkondiĉoj, fariĝas limgardisto kaj militas en baltaj landoj kun la "lastaj germanaj soldatoj".
1922 - Li faras ĉiujn eblajn metiojn, senlaboras, malsatas, intencas sin mortigi kaj fine aliĝas al nazia partio kaj al SA - organizo.
1929 - Lin dungas kiel farmiston orientgermania junkro, li edziĝas kaj fariĝas SS.
1934 - Hitler superregas Germanian. Nia "heroo" estas elektita por estiĝi Komandanto de Dachau-koncentrejo kaj poste de Auschwitz-koncentrejo. Tie Himmler konfidas al li la finofaron de l' juda problemo en Eŭropo. Finofaro kiun li plenumas tiel skrupule kiel li ĉion faris dum sia tuta vivo. Sen ke pli forte batu lia koro, sen ke ia bedaŭro estiĝu en lia animo, li amasmortigas milionojn da homoj.

Li nur faris sian patriotan devon.

Heil HITLER !

1945 - Neniigo de nazia Germanio. Nia "heroo" estas pendigita komence de aprilo 1946 je unu el la pendigiloj, kiujn li mem igis starigi en Auschwitz.

P.S. Kompreneble D-ro SALAN ne eldonigos tiun verkon. Ĉi eldono estus ja multe tro multekosta? Li eble ĝin enkasetigos. Sed unue necesas fini la tradukon, kaj kia laboro!!!

# VIVO DE LA GRUPOJ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

## Malfermo de Esperanto-Kursoj

Jen la periodo de la malfermo de la kursoj.

Bona metodo por havi sukceson estas glui sur la vitrinoj de kelkaj amikaj komercistoj niajn afiŝetojn kun klarigoj pri la horaro, tago, adreso, ktp...

Alia bona metodo estas la propagando pere de la gazetaro kiu havas la avantaĝon esti senpaga kaj kiu multe efikas !

En Perpignan, ĉiuj semajnoj, aperas en 3 ĵurnaloj kaj eĉ en la Radio, la anonco de la kurso. Tiamaniere la homoj konstatas, ke Esperanto vivas !

Ni havas bonŝancon en Perpignan havi montro-fenestron kun konstanta ekspozicio ĉe la sidejo de nia federacio, 72, Avenue Generalo de GAULLE. Tiu avenuo iras de la Placo de Catalogne al la Stacidomo kaj estas kompreneble multaj preterpasantoj.

La propagando de buŝo al orelo estas ankaŭ bona kaj se vi ne povas organizi publikan kurson vi povas tamen provi havi privatajn kursojn.

Precipe se vi estas emerito vi havas okazon trovi okupon, inter viaj familianoj kaj amikoj vi povas organizi privatan kurson hejme, eĉ se estas nur unu lernanto.

Se ĉiuj niaj federacianoj varbus unu novan lernanton, nia membraro duobliĝos !

Do al la laboro kaj se vi bezonas konsilojn skribu al mi. Dankon.

La Prezidanto,
René LLECH-WALTER

---

### E S P E R A N T O - S T A N D O

Dum la subĉiela festo de la socialista partio en Mialet, la 19-an kaj 20-an de junio, la miloj da partoprenintoj povis vidi sub la bela banderolo de la Federacio Gard - "ESPERANTO, une langue neutre pour tous les peuples" - standon starigitan de nia amiko PELLETIER, kun libroj, afiŝoj, revuoj, turistaj prospektoj, paneloj de diverslandaj poŝtmarkoj kaj konstati, ke Esperanto vivas.

La 19-an de septembro ni denove prezentis ĝin okaze de la festo de la Cevena revuo "Clinton", ĉe kastelo de Montmoirac en St Christol-les-Alès.

---

### FRANCA ESPERANTO- INSTITUTO

Sep gelernantoj de la kurso de la Kultura Esperanto-Centro (Profesoro: R. LLECH-WALTER) trapasis kun sukceso la Ateston pri lernado.

S-ino NOGUER Empar, F-ino SUBIROS Nicole, S-ro TESTAS Raymond, F-ino ROCA Elisabeth, S-ro NOGUER Georges, S-ro NOGUER Albert, S-ro AZAIS Patrick.

La disdono de la diplomoj okazis fino de septembro.

---

## Tutmonda Esperantista Kongreso en Montpellier

De la 20a ĝis la 27a de julio okazis en Montpellier ĉe la teologia fakultato, la 28a Kongreso de KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia).

Partoprenis 70 personoj el 13 landoj.

Okaze de tio oni aŭdis pri Eo, konstatis, ke Eo vivas kaj rekonis la fakton Eo.

Jen kelkaj interesaj (laŭ mi) rezultoj:

- en 3 lokaj revuoj (dumonataj) aperis 1 aŭ 2 artikoloj anoncantaj la kongreson kaj pritraktantaj Eon,
- unu profesoro de la teologia fakultato, reprezentanta ties profesoraron, direktoro kaj eksdekano, venis por saluti la kongreson kaj prelegi,
- sen nia invito, la televidaj ĵurnalistoj alvenis la unuan tagon kaj elsendis en la televida ĵurnalo,
- sen informo de ni, la radio de Montpellier parolis pri nia kongreso.

Aldonu la 60 eksterlandanojn, kiuj vizitis magazenojn; bank- kaj turism-oficejojn, kaj la 2 ekskursojn kun vizitoj kaj traduko en Eo...

Yvette VIERNE.

---

## NEKROLOGO

La 25-an de aŭgusto forpasis en Cendras S-ino PELLETIER, 93 jara , patrino de nia amiko, ano de la Alesa grupo.

Ni sincere kondolencas nian amikon kaj liajn gefilojn.

---

## Iom da gramatiko

Bonvolu traduki kaj ekspliki:

Li kuŝas en sia lito kun sia edzino

Li kuŝas en sia lito kun lia edzino

Li kuŝas en lia lito kun sia edzino

Li kuŝas en lia lito kun lia edzino

Li kuŝas en ŝia lito kun sia edzino

Li kuŝas en ŝia lito kun lia edzino

Goso .

---

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

**Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES**

Dépot Légal : 3me Trimestre 1976

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes